

*Gazeto*   
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

27-a Jarkolekto \* Decembro 2011 \* N-ro 94

ISSN 1576 - 0618



me la suno la rigas dekaj

Gazeto Andaluzia  
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.  
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ  
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
(esperanto14@ono.com)

Colaboró en este número: Juan CUQUEJO MIRA  
José ROLDÁN LEÓN

## **ENHAVO**

<b>Esperanto en Andaluzio .....</b>	<b>3</b>
<b>Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de AEU .....</b>	<b>8</b>
<b>La Al-Andalusa Abbas Ibn Firnas .....</b>	<b>12</b>
<b>Novelo “Ĉevaĉjoj” .....</b>	<b>14</b>
<b>Lingva Angulo .....</b>	<b>19</b>
<b>Poezio .....</b>	<b>22</b>
<b>Kiel kontakti kun la Andaluzia Esperanto-Movado...23</b>	
<b>Turismi en <i>Puente Genil (Kordovo)</i> .....</b>	<b>24</b>
<b>Paĝoj pri Nia Historio .....</b>	<b>28</b>
<b>Flamenko .....</b>	<b>30</b>
<b>Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio .....</b>	<b>31</b>
<b>Kiel aliĝi al A.EU.....</b>	<b>33</b>
<b>Humuro .....</b>	<b>34</b>

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.





## ESPERANTO EN ANDALUZIO



### MOTRIL

Ni jam ekinformis pasintnumere, pri la okazigo de elementa kurso de esperanto en la granada urbo Motril. Dank'al la kunlaboro de tiea esperantisto, Paco Sánchez, kaj Rafaelo Mateo, instruanto de la kurso, nia asocio sukcesis organizi intensan kurson de la internacia lingvo en ĉi tiu vilaĝo de la tropika marbordo dum la semajnfino 4-a kaj 5-a de februaro. Ĝi okazis ĉe kultura centro afable pruntedonita de la posedanto. Ĉeestis 9 personoj, ne nur de Motril sed ankaŭ de Granado kaj de Malago.

La motrilaj inform-medioj sufiĉe antaŭ-informis pri la kurso, tiel, kelkaj tagoj antaŭ la okazigo de la kurso oni intervjuis la sekretario de AEU, José María Rodríguez, kaj eĉ la loka televido *Onda Motril* abunde sciigis pri la kurso kaj pri esperanto mem. La motrila televido alvenis en la lokon kie okazis la kurso kaj oni intervjuis al Rafaelo Mateo kaj al Angel Arquillos, prezidanto de nia asocio.

Videblas la intervjuo ĉe la jutuba paĝo:

<http://www.youtube.com/watch?v=q3GBIkyhWmI&context=C31de49aADOEgsToPDskK82ORgjzYNmqtRu-yJkslq>



## KORDOVO

La pasintan 19an de februaro okazis en Kordovo la Ĝenerala Kunveno de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Temas pri la kutima renkontiĝo de estraro kaj membroj de nia asocio, ne okazanta dum la andaluzia kongreso sed ja dum la unuaj monatoj de la jaro. Okaze de ĉi tiu kunveno oni decidis la agadojn de la asocio dum la komencanta jaro. Ĉi-jare en Kordovo alvenis preskaŭ ĉiuj estraranoj de la Asocio. Pri la pritraktitaj kaj aprobitaj aferoj Vi povos legi sur aliaj paĝoj de ĉi tiu revuo. Nur indas diri nun, ke la kunveno estis tre fruktodona, post ĝi okazis komuna manĝado ĉe restoracio de la urbo, al kiu ankaŭ ĉeestis geesperantistoj de la urbo Kordovo.



Gesperantistoj en Kordovo – 19an de februaro 2012

## SEVILO

Okazis en Seviljo la pasintan 14-an de januaro la ĝenerala kunveno de Sevila Esperanto-Asocio. La tagordo pritraktis ĉefe du temojn: la pasinta Andaluzia Kongreso de Esperanto kie ankaŭ oni festis la unuan jarcenton de la esperanto-movado en Seviljo kaj la nomumo de la nova

estraro de la Asocio. Por la jaro 2012 kaj sekvantaj la estraro de la asocio estas jena:

Prezidanto: José Roldán  
Vicprezidantino: Lola García  
Sekretario: Antonio Rodríguez  
Kasisto: Francisco Carmona.

Post Pasko okazos alia kunveno por paroli pri la eldonado de la libro *“Cien años de esperanto en Sevilla”*.

## ONUBO

La 15-an de marto ĉe la kulturejo *“1900 Company Bar”* en Onubo, la hispana verkisto Jorge Camacho deklamis siajn poemojn en esperanto kaj en la hispana lingvo. Rafaelo Mateos prelegis pri esperanto kaj poste okazis debato kun la gartoprenantoj.



Jorge Camacho legas siajn poemojn, apude Rafaelo Mateos

## ALMERIO

Nia almeria samideano *Inda Segura* troviĝas dum la jaro 2012 en la germana urbo *Herzberg*, kiel voluntulo de la Germana Esperanto-Centro en tiu urbo. *Herzberg am Harz* estas urbo en la sudo de Malsupra Saksio kun 15.000 enloĝantoj. Laŭ decido de la urbaj deputitoj de la jaro 2006 la urbo portas la kromnomon “Die Esperanto-Stadt / La Esperanto-Urbo”. En la urbo troviĝas ankaŭ la Interkultura Centro Herzberg, kiu dum la tuta jaro okazigas Esperanto-kursojn, pluklerigajn studsesiojn, fakajn kursojn kaj aliajn Esperanto-aranĝojn, tiel *Herzberg* estas germana kaj internacia centro por klerigado de Esperanto-instruistoj.

Ni deziras al nia samideano *Inda* la plej fruktodonan restadon en Germanio.

## GRANADO

Unu el la plej videblaj rezultoj de la kurso de esperanto organizata en la urbo Motrilo dum la pasinta monato februaro, estas la revivigo de la Esperanto-Movado en la urbo Granado mem. Post la okazigo de tiu kurso la granada esperantistaro renkontiĝas ofte sabate ĉe trinkejo. Averaĝe ĉeestas ses homoj, kvankam tutcerte la nombro da geesperantistoj en la urbo kaj en la provinco estas multe pli granda. La komencanta grupo disponas pri blogo ĉe la adreso [esperantoengranada.blogspot.com](http://esperantoengranada.blogspot.com) kaj la jena elektronika adreso: [esperantoengranada@gmail.com](mailto:esperantoengranada@gmail.com).



Indalecio Segura, almeria esperantisto kaj profesia dancisto, okaze de danco-spektaklo.

Do, ĉiuj geesperantistoj, parolantoj aŭ nur simpatiantoj de nia lingvo, loĝantaj en Granado estas invitataj kontakti kun ĉi tiu nova grupeto. Inter la venontaj agadoj espereble okazos intensa dumsemajnfina kurso ĉi-foje en Granado mem, kio ja povas okazi eĉ antaŭ la somero.

---

Noto de la Redakcio:

Kiel ĉiuj legantoj povas vidi, ĉi-numere la nombro da paĝoj de la revuo malpliĝis, tamen ne temas pri manko da enhavo, nek manko da kunlaborantoj, feliĉe ni disponas pri sufiĉa materialo publikiginda, sed estas necese ŝpari kostojn rilate la dissendadon de la revuo, kaj pro tio ni devis malpliigi la pezon de ĉiu numero, do la nombro da paĝoj.

Ekde ĉi tiu numero la eldon-kvanto pligrandiĝis ĝis 180 ekzempleroj. Dankon al ĉiuj kunlaborantoj kaj al ĉiuj fidelaj legantoj de nia revuo kaj memoru, ke venontjare la revuo fariĝos 100-numera, ĉu ne estus bona okazo por eldoni tre specialan numeron?



## PROTOKOLO DE LA ORDINARA ĜENERALA KUNVENO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Ĉe la Junulara Restadejo de Kordovo, je la 12:30 horo de la 19-a de februaro de 2012, okazas la Ordinara Ĝenerala Kunveno de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kun la partopreno de:

Ángel Arquillos López, prezidanto de la Asocio.  
José María Rodríguez Hernández, sekretario.  
M<sup>a</sup> Dolores Torres Mateos, kasistino.  
José Roldán León, voĉdonanto de Sevilo.  
Rafael Mateos González, voĉdonanto de Onubo.  
Carmela San Segundo Cordero, Voĉdonantino de Malago.  
Juan Diego Díaz Bautista, junulara voĉdonanto

Estas reprezentataj pere de taŭga reprezentiloj jenaj membroj:

Ángel Robles Mata.  
M<sup>a</sup> Luisa Expósito Martos.

### TAGORDO

1.- La sekretario legas la protokolon de la lasta renkontiĝo, kiu estas unuanime aprobata.

2.- José Roldán León, voĉdonanto de Sevilo, prezentis resumon pri la pasinta 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, organizata ankaŭ de Sevilla Esperanto-Asocio por festi la unuan jarcenton de la esperanto-movado en Sevilo. La Prezidanto de AEU gratulis al S-ro Roldán pro la sukcesa organizado de tiu Kongreso.

Juan Diego Díaz Bautista prezentis la proponon, jam sciigita okaze de la 16-a Kongreso de Esperanto, organizi la venontan Kongreson en la urbo Arundo (Malago). Li proponis organizi tiun kongreson kadre de internacia renkontiĝo de geesperantistoj organizonta ankaŭ en Arundo. Li proponis por tiu renkontiĝo la nomon *Tut-Andaluzia Kongreso Internacia*. S-ro Roldán atentis pri la fakto ne konfuzi tiun



renkontiĝon kun la specifa Andaluza Kongreso de Esperanto. La Kunveno aprobis la proponon de S-ro Díaz kaj oni rekomendis propagandi internacive kiel eble plej amase kaj efike, cele alvenigi en Arundon grandan nombron da eksterlandaj geesperantistoj. Same, oni akceptis la proponon de la S-ro Díaz ekigi kontaktojn kun la lokaj aŭtoritatoj de la urbo Arundo por atingi taŭgan kongresejon. Fine, oni akceptis la proponon okazigi la Kongreson de la 5-a ĝis la 8-a de oktobro 2012.

3.- La Sekretario de la Asocio diskonigis la plenumitajn agadojn ene de la projekto “Anda-Lernu”, projekto aprobita okaze de la pasinta Andaluza Kongreso de Esperanto. Tiu projekto celas okazigi rapidajn kaj intensajn kursojn de esperanto dum semajnfino en diversaj andaluziaj urboj. Tiujn kursojn oni pripensis ĉefe por instrui la internacian lingvojn al tiuj interesitoj jam aliĝintaj al la interet-paĝo *lernu.net*. S-ro Rafael Mateos proponis sin por instrui la lingvon okaze de tiuj kursoj.

Oni informis pri la kurso jam organizita komence de la monato decembro en Kordovo, kun la ĉeesto de kvin gelernantoj. Same, okazis nova kurso en la urbo Motrilo (Granado) dank'al la kunlaboro de tiea AEU-ano Francisco Sanchez, al tiu kurso aliĝis naŭ gelernantoj.

Estos eble organizi novajn kursojn en Granado, Linareso kaj Jaeno. Oni dankis al S-ro Mateos pro lia sindonemo vojaĝi kien ajn tra la andaluza geografio por instrui esperanton.

S-ro San-Segundo, voĉdonanto de Malago, informis pri la organizado de elementa kurso de esperanto ĉe la malaga kulturejo “*La Casa Invisible*”. Du el la gelernantoj partoprenantaj en tiu kurso eĉ vojaĝis en Kordovon por ekpartopreni en la andaluza E-movado.

**Andaluza Esperanto - Unuiĝo**

**Asociación Andaluza de Esperanto**

4.- La kasistino sciigis pri la nuntempa ekonomia situacio de la asocio:

Enspezoj

Membro-kotizoj	454,00 €
Libro-servo	234,00
Mon-donacoj	284,23
Bank-interezoj	0,09

Entute: 971,32€

Elspezoj

Eldonado	881,78€
Redono al S-ro Herrero	222,00
Luoj	45,00
Libro-sendado	7,60
Identifiloj por la Kongreso	31,44
TTT-paĝo	22,13
Presaĵoj	18,75
Interezoj	47,00

Entute: 1.275,72€

Jara Bilanco - 304,80

Situacio je 31/12/2010 6.138,12€

Jara Bilanco 2011 - 304,80

**Situacio je 31/12/2011 5.833,72€**

Ĉe Granada Ŝparkaso 4.676,67€

Ĉe Banko BBVA 1.157,05

5.- La Prezidanto de la Asocio proponas pluvalidigi la buĝeton aprobita por la jaro 2011, ankaŭ por 2012. Tio estas aprobita unuanime.

6.- La sekretario de la Asocio informis pri letero sendita al S-ro Julio Herrero Segura, antaŭa sekretario de la Asocio, rilate la libron kaj

revuaron pri kiu ĝis nun disponis la asocio. Li ankaŭ informis pri la respondo de S-ro Herrero al tiu komunikado celanta klarigi la aferon. Per tiu respondo S-ro Herrero klarigis, ke Andaluzia Esperanto-Unuiĝo neniam disponis pri propra biblioteko, pro la fakto, ke la libroj kaj revuoj havigitaj al diversaj ekspozicioj organizitaj en Andaluzio, apartenis al S-ro Herrero mem kaj ne al la Asocio. Li ankaŭ klarigis, ke la informoj aperintaj ĉe la TTT-paĝo de la asocio Esperanta Civito, informanta ke AEU posedis bibliotekon kun 300 libroj ne estis veraj.

La sekretario informis al la ĝenerala kunveno, ke oni povis trovi nenian dokumenton atestanta pri la aĉeto de tiuj libroj fare de la asocio, ankaŭ ne pri la donacado, do ekzistis neniam pruvo pri la aparteno de tiu biblioteko al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La ĝenerala kunveno decidis daŭrigi nenian peton al S-ro Herrero rilate tiujn librojn, ĉar videble temis ĉiam pri privata kolekto da libroj.

La sekretario de AEU ankaŭ informis pri baldaŭa donaco de sia biblioteko pri esperanto kaj interlingvistiko, enhavanta pli ol 500 ekzempleroj al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La donaco okazos pere de oficiala dokumento por klarigi tute la aferon kaj tio okazos post la definitiva katalogado de la biblioteko. La ĝenerala kunveno dankis la donacon, tiu libraro estos la onta Biblioteko de AEU.

7.- Fine, oni malfermis la ĉapitron por peti kaj proponi. La sekretario de la Asocio proponis investi parton de la mono de la asocio, tio estas almenaŭ 4.000 €, por aĉeti la tiel nomataj "*bonos patrióticos*" de la Andaluzia Registaro, kio eblus la atingon de 5% jare kiel intereson. La kunvenon ne aprobis tiun proponon.

Kaj sen pliaj pritraktendaj aferoj, je la 14:15, finiĝis la ĝenerala kunveno de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

## LA AL-ANDALUSA ABBAS IBN FIRNAS,

*la unua homo kiu sukcese flugis.*


*Abu Al Kasim Abbas Ibn Firnas Ibn Wardas*, pli konata kiel Abbas Ibn Firnas, naskiĝis en la urbo Arundo (Malago) en la jaro 810. Li estis poeto, astrologo, alkemisto kaj muzikisto, verdire li estis unu el la plej konataj kaj plurtalentaj intelektuloj de Al-Andaluso. Oni ne konas detalojn pri lia familia deveno, do iuj asertas, ke li apartenis al berbera familio kaj aliaj, ke li vere naskiĝis ĉe kristana familio kiu poste islamiĝis.



Li apartenis al la kortumo de la emiro Al-Haksam la 1-a kaj poste al tiu de Abderahamano la 2-a. Kiel dirite, li estis esence saĝulo, do li estis lerta verkisto kaj ankaŭ multifaka sciencisto. Krome, li ludis la liuton. Li estis astrologo kaj mirigis al ĉiuj kortumanoj dank'al sia talento kiel prestidigiisto. La al-andalusa historiisto Ibn Hayyan eĉ nomis lin "*Hakim Al Andalus*", tio estas la saĝulo de Al-Andaluso. Li eltrovis formulon por produkti specialan kristalon, miksigita kun mineraloj, kiu antaŭenirigis la kristal-industrion de la Kordova Kalifejo. Kiel astrologo li konstruis horloĝon, kiu poste donacis al emiro. Tiu horloĝo simulis la ĉielon, kun nuboj kaj steloj kaj eĉ akompanita de tondroj kaj fulmo-tondroj.

Tamen, Ibn Firnas eniris en la plej konataj paĝoj de la Historio dank'al la fakto, ke li estis la unua homo kiu sukcese flugis. Inter la jaro 852 kaj 875 li ĵetis sin el alta turo en Kordovo, granda tolo malrapidigis kaj mildigis la falon, verŝajne li estis la unua paraŝutisto. Poste, li konstruis du flugilojn per bird-plumoj kaj ĵetis sin el monto nomita *Ruzzafa*, tuj apud Kordovo. Li sukcese glitis dum kelkdeko da

sekundoj. Tamen la enteriĝo ne estis sufiĉe bona kaj li rompiĝis ambaŭ krurilojn. Malgraŭ tio granda nombro da personoj povis vidi la unuan flugon de homo tie en Kordovo fine de la 9-a jarcento. Kiam li enteriĝis, li komentis al ĉiuj sian kalkul-eroron, li ne metis voston al sia konstruaĵo kaj tio malekvilibrigis lin. Lia invento alvenis 600 jaroj pli frue ol tiu samspeca de Leonardo da Vinci. Li forpasis en Kordovo en la jaro 887, li neniam pruvis denove flugi.



Nova ponto super la river Gvadalkiviro en Kordovo, sub la nomo Abbu Ibn Firnas. Ĝi similas al kolombo ekfluganta.

Hodiaŭ astronomia centro en Arundo, lia naskiĝ-vilaĝo nomiĝas tie: Abbu Firnas. Ankaŭ kratero en la luno ricevis sian nomon kaj antaŭ du jaroj granda kaj bela ponto super la rivero Gvadalkiviro apud la kordova flughaveno ankaŭ nomiĝas Abbu Firnas. La ponto similas al ekfluganta kolombo, simila al tiu paro da flugiloj ekkonstruitaj fine de la 9-a jarcento kiu ebligis al al-andaluso flugi, verŝajne la unua homo en la mondo kiu atingis tion.




## NOVELO

ĈEVAĈJOJ Juan Cuquejo Mira

Ronjo ŝategis la komercajn centrojn. Multfoje vidi tiom da homoj kapturnis ŝin, sed la vendejaroj estis lokoj plenaj de vidindaĵoj kaj petindaj donacoj. Ĉefe, ŝi ŝatis tiujn bretarojn, plenegaj de pluŝpupoj kaj ludiloj, tiujn koridorojn kie, ĉiudirekte, la okuloj ĉiam haltiĝis en skatoloj aŭ pupinoj kiujn ĉiuj deziregus. Ŝia patrino kondukis al ŝi je la mano kaj ili transiris la ĉefpordon de la grandega ejo, dum panjo diris ion al paĉjo. Ronjo ne ŝatis konscii, ke ili haltiĝis antaŭ mebla ekspozicio kaj ke ŝiaj gepatroj ekparolis pri malamuzaj aferoj. Ŝi rigardis maldekstren, la koridoron kie multaj homoj cirkuladis, kaj ŝi rimarkis ĉevaĉjon el plastiko, senmova sur ruĝa platformo, kiu havis ĉarmajn kaŝtankolorajn krinojn kaj blankan hararon, kaj kuris senmove. Ŝiaj esperoj tute frustriĝis kiam ŝiaj gepatroj ekpomenis kaj ili eniris en koridoron ĉirkaŭigita de seĝoj, tabloj kaj kofregoj.

Ŝia patro salutis viron, kiu portis mar-bluan jakon kaj helan pantalonon, kaj ili ekkonversaciis. La viroj parolis la tutan tempon, sed panjo intermetis kelkajn frazojn de tempo al tempo. Ronjo ribelis, ĉar ŝi senpacience deziris vidi denove la ludilojn, kaj profitante distriĝon, ŝi deigiĝis de la mano de sia



patrino kaj la infano kuris al la ĉevaĉjo, kiun ŝi vidis antaŭe. Panjo haltigis ŝin duonvoje kaj ŝi insistis kaj fingre montris la afablan besteton. Ronjo aŭdis paroli al ŝi, per milda voĉo:

- Ĉu vi volas rajdi sur la ĉevaĉjo?

Ronjo ne respondis; anstataŭe, ŝi disigis je la mano kaj denove ŝi kuris al la ĉevalo. Ĝi estis malgranda, do ŝi povis supreniri facile, ŝi ekrajdis surgrope tre ĝoje. Panjo haltigis apud la ruĝa platformo kaj ŝi prenis monujon el la mansako. Ŝi prenis moneron kaj gardis la monujon.

- Mi devas iri apud paĉjo. Ne foriru !

Ronjo aŭdis kiel la monero eniris en la maŝinon de la ĉevaĉjo, amuza muziko eksonis tiam, oni povis aŭdi ankaŭ la tipan batetadon de la hufoj de ŝia ĉevalo. Tenante forte la bridojn, ŝi imagis al si rajdanta, kun la forto de trijaraĝa infanino. Ŝi ŝategis rajdi ĉi tiajn ĉevaĉjojn kaj ŝi ridetis la tutan tempon, eĉ kelkfoje ŝi ridis. Kaj subite, la muziko silentiĝis, la hufa skuetado ĉesis kaj la ĉevaĉjo haltigis. Ronjo elreviĝis; kial ĉiam okazis same? Kiam ŝi plie amuziĝis, la ĉevaĉjo haltigis. Ŝi serĉis sian patrinon, sed ŝi estis apud paĉjo kaj ŝi parolis al li kaj al la viro en mar-blua jako. Ŝi ne estis tre fore de sia patrino, tamen ŝi estis sufiĉe malproksime por ne esti aŭdata de sia panjo; do, ŝi decidis resti sur la, denove, senmova ĉevaĉjo.

Tiam, knabino haltigis antaŭ la ĉevaĉjo kaj ŝi ridetis al Ronjo. Ŝi havis malhelan kaj longajn harojn, ŝiaj okuloj estis verdaj kaj tre altiraj, kaj ŝi havis blankan rideton. Ŝia voĉo ŝajnis al la infanino tre agrabla.

- Saluton.

Ronjo respondis nenion; ŝi nur rigardis la junulinon per malfermitegaj okuloj kaj fermitega buŝo. La knabino tuŝetis la muzelon de la ĉevalo kaj ŝi plie parolis, poste ŝi ridetis denove al la infano, dolĉe.

- Kiel bedaŭrinde ! Ĝi haltiĝis. Vi ŝategus, ke ĝi regalopu, ĉu ne?

La infanino kapjesis, kaj la rideto de la junulino pli grandiĝis.

- Ĉu vi scias kion oni devas fari por restarti ĝin?



Certe, Ronjo sciis tion tre bone. Panjo jam montris al ŝi kiamaniere ĝi funkciis, krome, ŝi vidis fari tion multfoje. Do, ŝi montris, per la montra fingro, la fendon tra kie oni devis enirigi la monerojn kaj ŝi respondis, per la ĉarma naiveco de trijaraĝa infanino:

- Per mono.

La knabino ruĝiĝetis pro honto.

- Ho, jes, kompreneble, per mono.

Ŝi tondis al si hartufon, kiun ŝi pasis malantaŭ la orelo kaj poste, ŝi plu-parolis reridetante:

- Ankaŭ, vi povas starti ĝin se vi karesas ĝin kaj vi petas.

La knabino tion faris kaj samtempe flustris al la ĉevaĉjo:

- Kuru, kuregu, mi petas.

Kaj tiam, Ronjo vidis, ke la knabino fermetis siajn verdajn okulojn kaj malrapide ŝi levis la krinojn per sia mano; kaj la infanino sentis, ke la spiro de la junulino rapidiĝis. Kaj subite, la ĉevaĉjo ekiris antaŭen, la muziko sonis lante kaj la hufoj batis unuafoje la plankon. Post kelkaj sekundoj, ĝi denove retromoviĝis kaj ree ĝi ektrotis. Ronjo ĝojiĝis pro la daŭra nova rajdado kaj ŝi rerideti. La knabino aspektis same, miksiĝita kun la platformo kaj la ĉevaĉjo. La infano amuze rimarkis, ke la ĉevalo ne haltiĝis. Tiam, ŝi vidis la knabinon rideti leĝere kaj Ronjo plenĝojiĝis.



Kaj, subite, la ĉevaĉjo haltiĝis kiam oni aŭdis la voĉon de panjo.

- Kia ĝentila! Ne estis necese, ke vi zorgu...

Ronjo vidis, ke la knabino paŝis maltantaŭen. La junulino ŝajnis konfuzita, kaj ŝi spiris maltrankvile, kaj tia reago seriozigis la vizaĝon de ŝia patrino. Tamen, la junulino ankoraŭ

preteratente, respondis:

- Ĉu...Ĉu vi estas ŝia patrino? –ŝi momente paŭzis- Ho! Estas granda plezuro.

Paĉjo manpremis la viron en mar-blua jako kaj panjo rerideti al la knabino dum ŝi malsuprenirigis Ronjon el ŝia rajdobesto. Panjo lasis la infanon stare apud ŝi kaj ŝi premis sian idinon per la mano. La patrino, kormole, diris:

- Kion vi devas diri?

Ronjo supren rigardis la knabinon kaj ŝi respondis per akuta voĉo:

- Mi dankas.

Kvankam la junulino respondis per rideto, la infanino konstatis urĝon en ŝia rigardo. La junulino adiaŭis permane kaj ŝi foriris rapide. Paĉjo alvenis apud ili preskaŭ samtempe kaj li demandis al panjo:

- Ĉu vi konas tiun knabinon?

La patrino kapneis mallevente siajn lipangulojn, ŝi respondis per surprizigita voĉo:

- Mi tute ne konas ŝin.

Tamen, verŝajne ili ne interesiĝis pri la ebla klarigo de la enigmo, ili ekpromenis en la arĝentokolorajn aŭtomatikajn pordojn de la superbazaro, tra kiu estis eble eniri. Ronjo ĝojiĝis; ŝi deziris diri al panjo, ke oni nur devis peti kaj la ĉevaĉjoj tuj ekmoviĝis. Neniam plu ŝi ne povus rajdi pro manko da moneroj. Sed tiumomente subite, ŝiaj okuloj trovis bretaron plena de pluŝursoj. Ĝuste tiam, nur ili interesis al Ronjo.





## Lingva Angulo

### La uzo de NEK kaj la emfaza EĈ NE

Ni ofte diris, ke ne estas konvene traduki rekte el la hispana en esperanton kiam ni deziras esprimi ion en la internacia lingvo. Kelkfoje, la strukturo de la frazoj en ambaŭ lingvoj estas similaj, sed plejfoje ne, do, ni sendube kutime eraros. Unu el tiuj kazoj estas la uzo de la hispanlingva “NI”, kiu ne ĉiam oni devas traduki per la esperanta vorto “NEK”. Ni vidu kiamaniere uzi ĝin.

Jen du hispanlingvaj frazoj:

- *No tengo ni coche ni motocicleta.*
- *Le he pedido dinero y no me ha dado ni un euro.*

Ĉu ni devas traduki ambaŭ *NI* pere de sama vorto, eble *NEK*, en esperanto? Tute ne!

Ni vidu ambaŭ tradukojn:

- *Mi havas nek aŭtomobilon nek motorciklon.*
- *Mi petis al li monon kaj li donis al mi eĉ ne unu eŭron.*

#### **Do, kiam uzi NEK ?**

*NEK* povas esti uzata sole aŭ pluroble kun plia aŭ pliaj *nek* (*nek...nek...nek....*). Se oni uzas sola, tiu *nek* signifas “kaj ankaŭ ne”. Tio estas, oni jam uzis *NE* kaj oni deziras nei ankoraŭ ion, pli malpli kvazaŭ varianto de “kaj”. Jen kelkaj ekzemploj:

- *Mi ne vojaĝis en Francion, nek en Germanion.  
Yo no he viajado a Francia ni a Alemania.*
- *Mi ne konas ŝian patron, nek ŝian patrinon  
No conozco al padre de ella, ni a su madre.*

Tamen, ne uzu NEK por ligi du aferojn post *SEN*.

- *Ŝi kuiras bongustajn dolĉaĵojn sen sukero nek-lakto.*  
Ella cocina unos deliciosos dulces sin azúcar ni leche.

Oni devas uzi: *SEN....KAJ.....*

Do, la ĝusta uzo de tiu frazo estas:

- *Ŝi kuiras bongustajn dolĉaĵojn sen sukero kaj lakto.*

Kiel dirite, ordinara NEK signifas “kaj ankaŭ ne”. Plurobla NEK signifas “kaj ne”, do ĉi tiu uzo de *NEK...NEK...NEK...* (plurobla *NEK*) egalas al *KAJ...KAJ...KAJ...* plus neado. Ĉi-foje oni ne uzas *NE* antaŭ la verbo.

Ekzemple:

- *Mi konas nek ŝian patron nek ŝian patrinon*  
*No conozco ni al padre ni a la madre de ella.*
- *Li konas malmultajn lingvojn, nek la hispanan nek esperanton.*  
*Él conoce pocas lenguas, ni español ni esperanto.*

**Kiam uzi la emfazan “EĈ NE” ?**

Ni vidu denove la alian frazon de la unua ekzemplo:

- *Le he perdido dinero y no me ha dado ni un euro.*  
*Mi petis al li monon kaj li donis al mi eĉ ne unu eŭron.*

Vidu, ke, malgraŭ la fakto, ke en la hispanlingva frazo aperas *NI*, en esperanto tiu *NI* oni ne tradukas per *NEK*.

*NEK* oni ne uzas por indiki “ne+emfazo”. Tiel, pere de la frazo “*no me ha dado ni un euro – li donis al mi eĉ ne unu eŭron*”, ni volas

emfazi, ke li donis al ni TUTE nenion “*ni un euro – eĉ ne unu eŭron*”. Por emfaze nei oni devas uzi “*EĈ NE*”: *mi petis al li monon kaj li donis al mi EĈ NE unu eŭron*.

Pliaj ekzemploj:

- *Eĉ ne unu libron li legis dum la tuta jaro.*  
*No ha leído ni un libro en todo el año.*
- *Mi ricevis de ŝi eĉ ne unu bonkoran vorton.*  
*No he recibido de ella ni una palabra de cariño.*
- *Mi konas eĉ ne unu homon en mia naskiĝ-vilaĝo.*  
*No conozco ni a una persona en mi lugar de nacimiento.*
- *Eĉ ne unu eŭron mi ricevis el lia heredaĵo.*  
*No he recibido ni un euro de su herencia.*

Ankaŭ oni povas meti *NE* antaŭ la verbo, ĉi-kaze oni ne lokigos *NE* post *EĈ*.

- *Li ne komprenas la ĉinan lingvon, eĉ unu vorton.*

Pliaj uzoj de *EĈ*:

*EĈ* montras, ke io estas surpriza, ne atendita, tamen ĝi okazas:

- *Li estas bonkora homo, li amas eĉ siajn malamikojn.*  
*Él es un hombre de buen corazón, ama incluso a sus enemigos.*

Tio estas, ne estas normale ami la malamikojn, tamen LI, ĉar bonkora homo, amas ĉiujn, eĉ siajn malamikojn.

- *Li estas tre lerta, li eĉ kapablas konstrui komputilon.*  
*Él es muy hábil, es incluso capaz de construir un ordenador.*
- *Li ne ŝatas vojaĝi per aviadilo, eĉ se li vojaĝas unuaklase.*  
*No le gusta viajar en avión, incluso si lo hace en primera clase.*

## Poezio

La dolĉa buŝo montras sin invita,  
ĝia humido lipa sorĉe tentas  
kaj pli ol la nektaro eminentas,  
kiun al Zeŭso verŝas fil' de Ida.

Sed vin fortenu! Tia buŝ' ekscita  
el inter lip' kaj lipo nur prezentas  
Amoron, kies sago ja identas  
al, inter flor' kaj flor', vipur' kaŝita.

Ne trompu vin la rozoj de Aŭroro,  
kaj diru ne, ke perle ili belas  
falinte de la sino purpur-ruĝa.

Tantalaj pomoj ili sin rivelas:  
eskapas ili post deloga horo,  
kaj lasas nur venenon Amo fuĝa.

Luis de Góngora y Argote  
Kordovo, 1561 ~ 1627

*Tradukis: Fernando de Diego*

2011-a

*450 datreveno de la naskiĝo de Luis de Góngora*

## Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:

- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
andaluciaesperanto@gmail.com
- ✓ Malaga Esperanto-Asocio “Marbordo de la Suno”  
<http://www.ipernity.com/home/123729>
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto  
info@esperantosevilla.org
- ✓ Asociación Cordobesa de Esperanto  
esperanto14@ono.com
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio  
ridinda@gmail.com
- ✓ Club de Esperanto de Ronda  
esperantoarunda@gmail.com
- ✓ Asociación Onubense de Esperanto  
rafnagon@yahoo.com
- ✓ Esperanto el Kadizo  
esperantokadizo@gmail.com
- ✓ Bulteno “Monate ĉe Vi”  
angelarquillos@gmail.com
- ✓ Revuo “Gazeto Andaluzia”  
esperanto14@ono.com



TTT-paĝo: [www.esperantoandalucia.com](http://www.esperantoandalucia.com)



## Turismi en ... PUENTE GENIL (Kordovo)

La unuaj homaj setlejoj apud la nuntempa *Puente Genil* datiĝas de Paleolitika Periodo, sendube, la ekzisto de rivero ebligis kaj eĉ faciligis la daŭran setlon de la unuaj enloĝantoj de tiu zono. Al la romia epoko, konkrete al la unua jarcento p.K., apartenas trovitaj restaĵoj de roma vilao ĉe la zono konata kiel *Fuente Alamo*. La visigotoj alvenis poste kaj hodiaŭ estas eble viziti belan tieupokan nekropolon. La araboj starigis kastelon dum la 10-a jarcento, nuntempe nomita kastelo *Anzur*, ĝi utilis por defendi la tutan zonan.

La fondiĝo de la unua vilaĝo okazis dum la 13-a jarcento, kiam la armeo de la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a sidejis apud la rivero *Genil*. Tamen, baldaŭ la armeo de la granada araba reĝo detruis tiun kristanan setlejon. En la jaro 1482 la reĝo Ferdinando alvenis en la lokon por defendi la vilaĝon *Alhama*, kiun sieĝis la granada reĝo. Tiam la loko ricevis la nomon "Ponto de Don Gonzalo", omaĝe al la kavaliro *Gonzalo Yañez Dovinal*, la fondinto de tiu unua setlejo.



### Blazono de PUENTE GENIL

Sur la blazono en la latina lingvo aperas *Quod Natura Seponit Socialitas Copulat*. "Tion disigita de la naturo la socio unigas".

Fine de la 16-a jarcento komenciĝis ankaŭ la setlado ĉe la zono trans la rivero *Genil*, tiu loko eknomiĝis *Miragenil*, kvankam ekzistis nur gastejo kaj preĝejo. Inter ambaŭ zonoj starigis ponto, la dekstra bordo nomiĝis *Puente de Don Gonzalo* kaj ĝi apartenis al la Markizo de Priego en Kordovo; la maldekstra bordo *Miragenil*, apartenanta al la sevila Markizo de Estepa. En la jaro 1834 la reĝino regentino aprobis dekretan unuiganta ambaŭ lokojn, naskiĝis tiam oficiale *Puente Genil*.

En la jaro 1864 oni starigis modernan ponton kaj nur unu jaro poste la fervojo alvenis en la vilaĝon, dank'al la haltejo de la fervojlinio inter Malago kaj Kordovo. Pro la konstruo de stacidomo kaj ankaŭ pro la baldaŭa instalado de elektra reto tra la vilaĝo, estis ebla la starigo de gravaj entreprenoj kiuj alvenigis riĉecon en *Puente Genil* jam komence de la 20-a jarcento.

Post la civila milito *Puente Genil* suferis malpliigon de la enloĝantaro, ĉefe pro la elmigrado de 3.000 homoj en Katalunion kaj en landoj de centra Eŭropo, kio ankaŭ okazis en preskaŭ ĉiuj zonoj de Andaluzio. En la jaro 1963 la rivero *Genil* elbordiĝis kaj eĉ superis la nivelon de la ponto, kelkaj kvartaloj restis izolitaj dum kelkaj tagoj. Hodiaŭ *Puente Genil* estas vilaĝo kun 30.000 enloĝantoj kaj dank'al la konstruo de la rapidtrajna fervojlinio inter Malago kaj Kordovo, kiu haltiĝas en *Puente Genil*, estas eble pripensi ekonomian prosperon de la urbo, kiu nuntempe baziĝas sur la agrikulturo, ĉefe sur la produktado de oliv-oleo, unu el la plej alt-kvalitaj en la mondo.

## Monumentoj

### Ponto super la rivero *Genil*

La primitivan lignan ponton anstataŭigis alia ŝtona starigita en la jaro 1583 kaj konstruita de la kordova arkitekto Hernán Ruíz. La ponto havis du arkojn, kvankam unu el ili faliĝis fine de la 17-a jarcento okaze de elbordiĝo. Dum la 18-a jarcento oni restarigis ĝin kaj oni aldonis novajn arkojn.



### Palaco de la Duko *Medinaceli*



Konstruita dum la 18-a jarcento, ĝi havas tre elegantan korton ĉirkaŭigita de kolonoj el ruĝa jaspo. La faŝado estas baroka kaj sur ĝi aperas nobelaj blazonoj kaj belaj balkonoj. Ene de ĝi troviĝas ĉefa ŝtuparo kaj ora salono kun tre valora meblaro.

### Preĝejo *Nuestro Padre Jesús Nazareno*

Komence ĝi estis malgranda preĝejo situita ekster la vilaĝo, oni starigis ĝin en la jaro 1590. Oni rekonstruis la preĝejon komence de la 20-a jarcento. Ĝi havas belan enirejon kun tri arkoj. Ĉe la faŝado starigas du sonoril-turoj malsimilaj, unu el ili ankoraŭ ne finita.

### Preĝejo *Santiago*

Ĝi starigas sur la loko kie estis la unua preĝejo konstruita ĉe la kvartalo *Miragenil*, tiutempe apartenanta al la sevila Markizo *Estepa*. Temas pri malgranda preĝejo kun belegaj azuleĥoj ĉe la enirejo kie aperas bildo de la kompostela katedralo.



## Festoj

Sendube la Pasko estas la plej grava festo en Puente Genil, ĝi estas unika. Apud la kutimaj religiaj paradoj tipe andaluzaj, ĉe la bibliaj korporacioj ariĝas personoj en vestaĵoj kaj maskoj reprezentantaj la Paskon kaj aliajn bibliajn historiojn. Stariĝas ankaŭ la kazernoj, vivaj muzeoj de la Pasko kie religio kaj popola sento miksiĝas kun la muziko, la gastronomio kaj la arto. Komence de majo okazas la infana pasko, kiam la infanoj organizas similan paskan feston al tiuj de la plenaĝuloj.

La *Reĝa Foiro* okazas meze de la monato aŭgusto, temas pri tipa andaluzaj foiro, kvankam ĝi estas unu el la plej antikvaj de Andaluzio. Ĝi komencas per la Flamenka Festivalo “Fosforito”, sendube la plej granda flamenka kantisto de Puente Genil.

## Gastronomio

La gastronomio en Puente Genil baziĝas sur la kvalito de la legomoj de la multnombraj hortoj de la zono. Tomatoj, melangenoj, paprikoj kaj ĉefe oliv-oleo estas la bazo de la ĉefaj kuiradoj de ĉi tiu vilaĝo. Ankaŭ la porkaĵoj ĝuas gravan lokon ĉe la lokaj kuirejoj. Dum la festo de Sankta Marko, kiam okazas pilgrimado, oni ellaboras akvan salaton kun dispecigita ovo. Sed la plej grava kaj konata produkto de Puente Genil estas la cidonimarmelado, hodiaŭ ankoraŭ ellaborata de ĉiu dommastrino. Konataj ankaŭ estas la vinoj de Puente Genil, ellaborataj ĉe la vinkeloj *Delgado* kaj *La Purísima*.

Venont-numere Turismi en .....

*Écija (Sevilo)*

## Paĝoj pri Nia Historio

### ***Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio***

*Casto Vilar y García, sevila esperantisto.*

Sur pasinta numero de nia revuo ni parolis pri la unua kurso de la internacia lingvo esperanto okazinta en la urbo Seviljo, dum la printempo de la jaro 1910-a. Oni diris tiam, ke la kurson inaŭguris la prestiĝa katedratiisto de la franca lingvo S-ro Casto Vilar y García. Verdire, tiu ne estis la unua kurso aranĝita de S-ro Vilar, kelkaj monatoj antaŭe kaj kunlabore kun la kadiza esperanto-pioniro S-ro José Garzón Ruíz, Casto Vilar instruis esperanton ĉe la Kadiza Gimnazio. Oni devas memori, ke li estis profesoro en la Teknika Gimnazio de Seviljo, li eĉ petis kaj atingis specialan permeson de la Ministerio pri Edukado dum kompleta monato, marto de 1910, sendube por aranĝi tiun kurson de la internacia lingvo en Kadizo kaj ekigi tiun de Seviljo.



Poŝtkarto eldonita okaze de la Iber-Amerika Ekspozicio de Seviljo - 1929

Kiel dirite, Casto Vilar y García estis unu el la plej prestiĝaj katedratiistoj pri la franca lingvo en Hispanio. Li naskiĝis en la jaro 1851 kaj en 1890 li atingis katedran postenon ĉe gimnazio por instrui la

francan lingvon. En la jaro 1895 li verkis la plej kompletan libron pri franca fonetiko kaj leksikologio de tiu epoko kaj en 1900 li doktoriĝis pri Filozofio. Li sekvis studojn en eksterlandaj universitatoj dank'al stipendio de la Ministerio pri Edukado kaj li amikumis kaj korespondadis kun la plej prestiĝaj hispanaj intelektuloj de tiuj jaroj, inter aliaj kun Marcelino Menéndez Pelayo.

Verdire, oni ne scias kiam li ekkontaktis kun esperanto, tamen li estis poligloto, li regis ok lingvojn kaj li eĉ tradukis librojn ne nur el la franca, sed ankaŭ el la germana kaj el la klasika grek-lingvo. Kiel dirite, li instruis esperanton en Kadizo kaj en Sevilo en la jaro 1910. La kursoj daŭris nur kelkajn monatojn, ĉefe pro la fakto, ke okazis klasoj ĉiutage. S-ro Vilar nur povis ĉeesti la kurson en Sevilo dum la unuaj semajnoj ĉar, pro malsaniĝo, li devis iri en la sevilan montaran vilaĝon La Puebla de los Infantes, pro konsilo de sia kuracisto. Kiel kuriozaĵo oni povas diri, ke nur unu monato post la alveno de Casto Vilar en La Puebla de los Infantes, tio estas en aprilo de 1911, oni fondis esperantogrupon en tiu sevila vilaĝo, la prezidanto estis la pastro de La Puebla kaj la vic-prezidantoj la loka kuracisto kaj funkciulo de la urbodomo. Eble temas nur pri hazardo, sed nur unu monato post la alveno de la prestiĝa katedratiisto kaj esperantisto en La Puebla de los Infantes la lokaj pastro, kuracisto kaj funkciulo jam uzis kaj disvastigis la internacian lingvon.

Kiam jam en Sevilo agadis gravaj esperantistoj, dank'al la organizado de tiuj unuaj kursoj, kiel Trinidad Soriano, la vera animo de la grupo, la Pastro Jerónimo de Córdoba, Karolo Martínez, Rafael Fiol kaj aliaj prestiĝaj samideanoj, Casto Vilar y García estis la ĉefa gvidanto de la Sevila Esperanto-Asocio, kies honora prezidanto li estis. Li emeritiĝis en la jaro 1921 kaj komence de la jaro 1925 li forpasis.



Historia Arĥivo de Andalusia Esperanto-Unuiĝo

Apartado de Correos 611

14080 Córdoba ~ [esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

## FLAMENKO

Ĉu flamenka arto en Nov-ĵorko? Sendube jes ! Okazas ĉi-jare la 12-a Usona Flamenka Festivalo, inter la 24-a de februaro kaj la 11-a de marto, en la urboj Nov-ĵorko, Vaŝingtono, Miamo kaj Bostono. La ĉefa karakterizaĵo de la ĉi-jara festivalo estas la miksiĝo inter la flamenka arto kaj aliaj artaj stiloj, ĉefe tiuj amerikaj.

Tiel, okazas komuna spektaklo kie ludos flamenko kaj ĵazo kun *Niño Josele* kaj *Doug Wanble*; nuntempa danco kaj flamenko kun *Olga Pericet*; flamenko kaj popolaj muzikoj kun *Rafaela Carrasco*; usona klak-danco kaj flamenko kun *Jason Samuel* kaj *Juan de Juan*; kub-devena muziko kaj flamenko kun la hispana kantisto *Pitingo* kaj fine latinaj gitaroj kaj flamenko kun *Carlos Santana*.



La unua Usona Flamenka Festivalo okazis en la jaro 2001 kaj ekde tiam oni organizis pli ol 300 spektaklojn en 24 urboj kaj antaŭ pli ol 500.000 spektantoj. La ĉefa atingo de ĉi tiuj festivaloj estas la fakto, ke ili prezentas la veran bildon de la flamenka arto eksterlanden, fore de tipaj kliŝoj ligitaj al taŭro-ludado aŭ al turismaj suveniroj.

*“La flamenka festivalo sekvas difinitan linion. Neniu alia kultura agado eklipsas ĝin, nek pro la sukceso nek pro la honoro alvenigi la plej aktualajn gravulojn de la flamenka arto”* *New York Times*

## Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

### *La pavilono por kolombo-pafadi en Jabugo (Onubo)*

Proksime al la onuba vilaĝo *Jabugo* en provinco Onubo troviĝas impona konstruaĵo meze de la kamparo, ĉies konita kiel “*Tiro Pichón*” (Kolombo-Pafado). Starigis ĝin fine de la 20-a jardeko de la pasinta jarcento la unua Markizo de Aracena, S-ro Javier Sánchez Dalp kaj la arkitekto estis unu el la plej prestiĝaj tiutempaj arkitektoj, la sevila Anibal González.

La Markizo de Aracena deziris alvenigi en tiun zonon la plej riĉajn sevilaĵajn familiojn kaj pro tio, li ordonis la konstruon de ĉas-pavilono kie praktiki la kolombo-pafadon, agado tre ŝatata de la aristokataro dum tiuj jaroj. Li eĉ revis inviti la hispanajn gereĝojn ĉeesti tiun konstruaĵon, kio sendube pliigus la diskonigon de la tuta zono. Verdire vizitis ĝin ofte la filinoj de la hispana reĝo, ĝis la ekziliigo de la tuta familio post la proklamo de la hispana respubliko en la jaro 1931. Post tiu jaro la loko utilis unue kiel kampadejo por infanoj, poste kiel hospitalo kaj eĉ, laŭdire, kiel frenezulejo, pro tio ĉiuj konas la lokon ankaŭ kiel “*La Frenezulejo de Jabugo*”.



Konstruaĵo konata kiel *Tiro Pichón*  
en *Jabugo* (Onubo)



Pri la konstruaĵo ekzistas multaj onidiraĵoj, se oni parolas kun vilaĝanoj ĉiuj asertas, ke oni “sentas” la rigardojn kaj konstanta apudeco de ne-vidataj entoj, krome laŭdire estas eble aŭskulti terurajn voĉojn. Kelkaj spertuloj pri parapsikologiaj aferoj venis en la lokon por studi la strangajn fenomenojn, jen la komentoj de unu el ili post studi la aferon surloke:

*“Estis malvarma novembra vespero, dum pli ol ses monatoj ni ofte vizitis la lokon. Tiu vespero ĉio komenciĝis trankvile, ni instalis 15 detektilojn tra la tuta konstruaĵo, ankaŭ laserajn alarmojn ĉe la koridoroj. Kelkaj komputiloj ebligis la kompletan vidadon de la loko kaj krome son-registritoj serĉus misterajn sonojn. Post kelkaj horoj stranga muziko aperis, temis pri melodio de muzik-skatoleto. Ni ekserĉis la ĝustan lokon el kie aperis la muziko. Ni eniris en koridoron konstruita en la jaro 1941, kiam la loko utilis kiel hospitalo, tie estis eble aŭdi plendajn kriojn de infanoj. Tiam, post ni, eksonis paŝoj kaj subite aperis ombro, ni kuraĝis demandi “ĉu ni estas solaj ĉi tie?” Ni tuj povis aŭskulti voĉon krianta “en-fer-mi-zo (malsanema). Post la atenta aŭskultado de la son-registritoj aperus poste novaj voĉoj kriantaj “Venid” (venu). Ni neniam ĉesis senti ion post ni, la kompasoj freneziĝis kaj ili perdis la orientiĝon, la piloj de la lanternoj subite elĉerpiĝis. Tiam, alia esploristo fotografiis la ĉambron, tie aperis vizaĝo de maljunulo post la fenestro. Verdire io stranga kaj ne-konata okazis ĉe la konstruaĵo, io ne klarigata de la logiko...”*

Sendube la konstruaĵo estas nuntempe unu el la plej allogaj lokoj por ekigi studon pri parapsikologiaj aferoj, se reale estas certa ĉio dirita pri la loko.



## ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: [andaluciaesperanto@gmail.com](mailto:andaluciaesperanto@gmail.com)  
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada  
2031 0225 54 0100187657
- BBVA  
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2012

**DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.**



## Solvo al la krucvortenigmo de la numero 92-a

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	R	E	G	L	A	M	E	N	T	O
2	A	T	L	E	T	O		E	N	E
3	T	R	A	K	O	M	O		I	F
4	I	E	N		M	E	Z	U	R	I
5	F	L	O	R	E	N	O		O	R
6	I			E			T	R	A	K
7	K	O	R	A	N	O		T		K
8	A	L	E	R	O	N	O	N		
9	S	U	O	M	I		I	E	N	
10		I	N	I	P	A	K	S	E	

## HUMURO



**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**  
**Asociación Andaluza de Esperanto**



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Seviljo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López  
Sekretario: José María Rodríguez Hernández  
Kasistino: María Dolores Torres Mateo  
Voĉdonanto de Seviljo: José Roldán León  
Voĉdonanto de Malago: Karmela San Segundo Cordero  
Voĉdonanto de Onubo: Rafael Mateos González  
Voĉdonanto de Arundo: Fátima Jiménez García  
Voĉdonanto de Jaeno: Nomumota  
Voĉdonanto de la Malaga Akserkio: Nomumota  
Voĉdonanto de la Junularo: Juan Diego Díaz Bautista

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)  
[esperanto14@ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

Blogo: [www.andaluciaesperanto.blogspot.com](http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com)  
TTT-paĝo: [www.esperantoandalucia.com](http://www.esperantoandalucia.com)

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)



# Hispana Kongreso 2012

## Congreso Español de Esperanto

*Esperanto* 125 años derribando fronteras  
jarojn faliganta limojn



### Almagro

27 abril/aprilo - 1 mayo/majo 2012



Participación Colaborativa:



[www.esperanto.es](http://www.esperanto.es)

[www.lem.unet](http://www.lem.unet)

-----